

Eŭropa Bulteno

junio 2006, № 6 (48)

De la redakcio...



Karaj gelegantoj,

Venonta numero de Eŭropa Bulteno aperos kiel kutime rete, sed ankaŭ en papera eldono, farita speciale por Universala kongreso en Florenco, Italio. Mi invitas vin trarigardi ankaŭ retan eldonon, ĉar estos anoncita Programo de la 7-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-unio, okazonta inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 2007 en Maribor, Slovenio. Vi trovos ĉi tie ankaŭ multajn aliajn utilajn informojn, do, ne pretarlasu ilin.

Dum venontaj du monatoj preskaŭ ĉiuj ferios kaj vojaĝos. Mi deziras al vi bonan vojaĝon kaj multe da renkontoj kun amikoj de tuta mondo. Fartu bone en Florenco, en Sarajevo, kaj kie ajn vi estos!

Kaj skribu poste, mi ĝoje publikigos viajn feriajn rakontojn.

Someran saluton kaj agrablan legadon!

Vesna Obradović

EU-PARLAMENTANOJ INVITITAJ AL UK EN FLORENCO

Dank' al kunlaboro de Landaj Asocioj, EEU sukcesis pretigi invitilojn al ĉi-jara Universala Kongreso por EU-parlamentanoj – kaj ĉi-semajne dissendi ilin (dank'al EU-parlamentano *Małgorzata Handzlik*) en ĉiuj oficialaj EU-lingvoj (krom la estona, kies tradukon ni ne ricevis ĝis la forsendo). La invito estis sendita nome de *Renato Corsetti* kaj *Seán Ó Riain*.

Kompreneble, oni ne esperu pri ia granda vizit-atako far' EU-parlamentanoj al nia kongreso, tamen – tiuj ĉi (kaj similaj) agadoj estas bezonataj – por konsciigadi la decidulojn pri la ekzisto de nia lingvo, de la E-komunumo kaj de la nediskriminacia komunikado internacia.

Same, meze de junio estis forsenditaj al EU-parlamentanoj leteroj – konciza informilo pri *Grin-raporto*, kiun la parlamentanoj same ricevis en sia lingvo.

La leteroj troveblas ĉe: <http://lingvo.org/grin>

Peter Baláž

KONFERENCO PRI LINGVA POLITIKO, MULTLINGVECO KAJ EKONOMETRIO EN BRUSELO

Okazis la 9an kaj la 10an de junio en Bruselo konferenco pri lingva politiko, multlingveco kaj ekonometrio, organizita de du belgaj Universitatoj (Lovenjo kaj Bruselo).

Kvankam la prelegoj okazis nur en la angla, oni tamen menciis la gravecon de la aliaj lingvoj, kaj eĉ, oni ankaŭ aludis Esperanton, kiel eblan rimedon estontece (traduki ĉion en ĉiujn lingvojn aŭ ne eblus aŭ oni bezonus milionojn da paĝoj kaj miliardoj da euroj!). Inter la ĉeestantoj, estis esperantistoj : S-roj Istvan Ertl, Miĉele Gazzolo kaj Seán Ó Riain, Prezidanto de EEU, kaj S-ro Marcel Delfogre reprezentis BEF (Belga-Esperanto-Federacio).

Tre interesan prelegon pri evoluo de la multlingveco en E.U. faris la Ĝenerala Direktoro de la Tradukservo de la Komisiono: S-ro Lönnroth. Profesoro Philippe Van Parijs kaj Profesoro Francois Grin prelegis respektive pri la diversaj sencoj de "diverseco", kaj pri la malegaleco en la nuna lingva dominado de unu nacia lingvo. Kiam Profesoro Grin substrekiis ke endas tre vasta analizo, kaj ke oni nenion ekskludu neracie, Seán Ó Riain aludis la voĉdonadon de aprilo 2004 en la Eŭropa Parlamento, kiam ĉirkaŭ 43% subtenis mension de ebla kontribuo de neŭtrala lingvo kiel Esperanto en la konservado de multlingveco en la Eŭropa Parlamento, sed kiam ĉirkaŭ 57%, plejmulte la dekstrularo, forĵetis eĉ la eblon diskuti pri rolo por Esperanto. Li substrekiis ke tiu decido estis neracia, kaj ke oni devus povi atendi pli racian reagon de parlamentanoj kiuj ricevas bonan salajron de la popolo. Neniu kontraŭis lian eldiron.

Multaj prelegantoj estis ekonomistoj kiuj proponis interesajn teoriojn sed ne havas profundan sperton pri lingvaj problemoj. Dum paŭzo en la konferenco venis Profesoro Grin al Seán Ó Riain kaj ili havis longan kaj tre utilan konversacion pri la taktiko konatigi la GRIN-raporto."

Seán Ó Riain

DENOVE PREZENTITA ĈE LA ITALA PARLAMENTO LA "LEĜO PRI ESPERANTO".

Deklaro de la sekretario de ERA Giorgio Pagano

Per Akto n-ro 129 de la ĉambro de la deputitoj estis denove prezentita je la komenco de la nova parlamenta periodo fare de Andrea Colasio de la frakcio "Marĝerita" la Leĝ-propono favore al la Internacia Lingvo:

"Dispozicioj por la defendo de la lingva-kultura diverseco kaj por aserto de valoroj de paco kaj demokratio kaj progreso pere de antaŭenigo kaj instruado de la internacia lingvo esperanto".

La teksto restis la sama jam sugestita de la radikala asocio "Esperanto" (ERA) en la pasinta parlamenta periodo, kies itinero konkludiĝis per Aŭskultado de la Sekretario de ERA Giorgio Pagano mallonge antaŭ la fermo de la ĉambroj.

Nun ni devos labori – deklaris Pagano – por ke la Leĝpropono trovu aŭskulton kaj sukcesu atingi konsentojn. Mi opinias, tamen, ke la neceso de kundividita Federacia Lingvo konsistigas por Eŭropo elementon sen kiu vera kaj efektiva ekonomia konkurado ne povos realiĝi, kun tre gravaj damaĝoj al la ekonomio de la eŭrop-uniaj civitanoj kaj de la eŭropa konkurenc-kapablo sur la tutmonda merkato. Mi esperas do, ke niaj parlamentanoj estu pli kaj pli konsciaj pri tio kaj donu al ni la eblecon surkampigi veran eŭropan alternativon fronte al la imposto pagata al la angla lingvo.

100-JARIĜO DE GEA EN BRUNSVIKO



De la 2-a ĝis la 5-a de junio okazis en Brunsviko (Braunschweig) Germana Esperanto-Kongreso okaze de la 100-jariĝo de Germana E-Asocio (fondita en 1906 en la sama urbo). Partoprenis pli ol 200 kongresanoj el Germanio kaj 13 aliaj landoj. La kongreson salutis Renato Corsetti, prezidanto de UEA kaj Zlatko Tišljar, sekretario de EEU. En bona etoso (amuzis la kongresanojn litova ensemblo Asorti, germana kantisto Ralph Glomp kaj aliaj) okazis la kongreso de unu el la plej gravaj E-asocioj kaj historie kaj nuntempe. En la unuaj jaroj de Esperantomovado germanoj estis laŭnombre la plej granda grupo post rusoj, en Germanio aperis la unua E-revuo kaj fondiĝis unua E-societo. Tio estas partetoj el la prelego pri la historio de E-movado en Germanio, kiun prezentis Ulrich Lins. Krom li prelegis Detlev Blanke pri historio de E-asocio en Germana Demokratia Respubliko kaj Werner Borman pri la sepdekaj jaroj. Prelegis ankaŭ Renato Corsetti pri la E-movado, Wera Blanke pri ATAC-movado, Andi Kuenzli pri enciklopedia vortaro, Petro Chrdle pri ekoturismo kaj mi pri »Kion lernu EU pri lingvoj el eksjugoslavia kazo?«. Okaze de ekskurso unu grupo vizitis tre aktivan E-centron en urbeto Herzberg (ĉirkaŭ 100 km de Braunschweig), kie duopo laboras profesie kaj sukcesis atingi gravajn rezultojn. Subtenas la centron urbestro kaj multaj instancoj. Okazas E-kursoj en ĉiuj lernejoj, okazas seminarioj, stariĝis biblioteko.

Malgraŭ kelkaj mankoj (mi havis la impreson ke oni ne sufiĉe allogis la nacilingvajn publikrimedojn kaj ke tia jubileo devus esti pli malfermita al la ĝenerala publiko), la kongreso montris la rolon de germanaj esperantistoj en la E-movado tra la historio kaj nuntempe. En apartaj ejoj oni prezentis ankaŭ kvalite preparitan ekspozicion pri la germana E-historio. Impresis min aparte iu artikolo en nazia gazeto »Der Stuermer« aperinta en 1923 kiu okaze de la nurenberga universala E-kongreso atakis la esperantismon per blasfemaj rasismaj vortaĉoj de la plej primitiva tipo. Ne estis mirinde ke poste la nazioj murdadis esperantistojn.

La kongreso montris ke GEA disponas ankaŭ pri konsiderindaj junaj fortoj. GEJ reprezentiĝis en la kongreso kaj la Hamburga grupo (kiun konsistigis ankaŭ sufiĉe juna teamo) invitis al sia urbo germanajn esperantistojn al la kongreso sekvajare.

Zlatko Tišljar

MEZEŬROPA RENKONTIĜO EN HUNGARIO

Konsultiĝo de sep Landaj Esperanto-Asocioj de Meza Eŭropo en Budapeŝto - okazis dum la 17a-19a de marto 2006 (en la * hotelo Monte Kristo)**



Pli precize, vera kunsido okazis nur dum la sabata tago, la 18an de marto, vendredo estis alventago kaj dimanĉe ne plu okazis ajna komuna programo (nekalkulante matenmanĝon).

Kunvenis reprezentantoj de *Aŭstrio*, *Ĉeĥio*, *Hungario*, *Kroatio*, *Pollando*, *Slovakio*. Observanto venis el *Bulgario*, mankis *Slovenio*.

La ĉeestintoj: Naŭ eksterlandanoj kaj sep Hungaroj

Aŭstrio: Christian Eppler.

Bulgario: Milĉo Beloreŝki.

Ĉeĥio Petro Chrdle (vicprezidanto), Jana Melichárová (prezidantino)

Hungario: Veronika Acsádi, Iván Bujdosó, Endre Dudich (vicprezidanto), Julianna Farkas-Molnár, Lajos Molnár (EEU-respondeculo), György Nanovfszky (prezidanto), Imre Szabó

Kroatio: Boris Di-Costanzo, Spomenka Ŝtimec (sekretario)

Pollando: Aleksandr Zdechlik (vicprezidanto)

Slovakio: Peter Baláž, Juraj Gondžúr.- P. Baláž reprezentis ankaŭ EEU-n.

La ĉefaj temoj diskutataj estis:

- La EU membreco kaj la perspektivoj de la Esperanto-movado;
- Stimulo de la NITOBESimpozio okazinta en Vilniuso dum la 90-a UK al la landoj de la t.n. Viŝegrada Kvaropo;
- La situo de Esperanto-instruado en lernejoj, inkluzive la universitatojn, kaj la spertoj de la lingvokapableco-ekzamenoj en Hungario



La aranĝo montris, ke malgraŭ reta konekto kaj telefon-ebloj nuntempaj tamen gravas ankaŭ „vivaj“ renkontiĝoj kaj diskutoj kun interŝanĝoj de opinioj, labor-planoj, kunlaboroj... - kiuj ebligas pli intensigi la reciprokajn amikecojn kaj kunlaboremon, kaj ebligas ekscii pri la aferoj „malantaŭ sia landlimo“.

Oni povis aŭdi spertojn de unuopaj landoj (pri multflankaj temoj, tuŝantaj E-on: instruado, informado, organizado de aranĝoj...), kiuj estis vere utilaj kaj inspirigaj. Certe sam-specaj aranĝoj estus utilaj ankaŭ en aliaj regionoj – en kiuj E-istoj strebu pere de kunlaboro efektiviĝi la utilecon de nia lingvo (en kelkaj landoj tia kunlaboro efektive ja ekzistas).

Ontjare la daŭrigo de la konsultiĝoj transprenas je siajn ŝultrojn Slovakio - kie la konsultiĝo okazos (verŝajne aprile, en la urbo *Martin*).

La aranĝo certe meritis pli da tempo, dediĉita al la komunaj projektoj, reciprokaj informado kaj kunlaboro – ĉu tutmonda aŭ nur landa. Ĉi-foje estis vere malmulte da tempo – por povi vere serioze pridiskuti la aferojn profesi-nivele kaj profunde. Ni esperu, ke ontjare la aranĝo dediĉos pli da tempo por diskutoj kaj labor-planoj, por ke la vojaĝo kaj resto vere utilu por ĉiuj ĉeestontoj kaj kreu fruktojn, maturajn kaj dolĉajn.

Peter Baláž

(detaloj ĉerpitaj de raporto de E.Dudich)

SLOVENA ĴURNALO PRI ESPERANTO

Kvin paĝoj pri esperanto en aldono de maribora ĵurnalo Večer



La 27-an de junio, marda aldonaĵo "Bombon" (bombono) de maribora ĵurnalo Večer, en sia 19-a ĉi jara numero anoncis kvarpaĝan artikolon kun esperanta titolo "Ĉu vi parolas Esperanton?". Ĝi aperis kiel 76.050-ekzemplera eldono. Ili ankaŭ faris enketon inter hazardaj preterpasantoj kun demando "Ĉu vi lernus Esperanton se tio estus bezonata?" kaj ankaŭ tion publikis kiel apartan rubrikon, sed kune kun la ĉefa teksto pri internacia lingvo. Demanditaj gejunuloj (lernantoj de mezlernejoj kaj studentoj) ĉiuj jam sciis pri Esperanto, inter ili ok nur du personoj tute kontraŭis pri ĝi, unu de ili jam aliĝis al kurso ĉe Filozofia fakultado en Ljubljana kaj aliaj diris, ke se tio utilis pri iliaj laboroj ili certe lernus ĝin.

Ĵurnalistino Mojca Grandovec skribante la artikolon faris inetvuojn kun Zlatko Tišljar, Vesna Obradović kaj Janez Jug.

Gelernantoj de slovenaj mezlernejoj de la lerneja jaro 2005/06 havas eblecon mem elekti Esperanton, kiel 30-horan devigan lernejan kurson (ili elektas inter proksimume 250 diversaj tridekhoraj programoj).

Vesna Obradović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 27-an de junio 2006.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Seán Ó Riain, Zlatko Tišljar, Peter Baláž, kaj Vesna Obradović.

Leterojn kaj komentojn sendu al la serretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>